gas en mi la malamon, kiun mi sentis al la uzurpulo... Ne, li ne estas mia frato! Li estas kiel tiu uzurpulo, kiu venas min rabi... Ha, ne!... Mi freneziga! Mario estas honesta!... Ŝi estos ĉiam!... Sed, kial ŝi foriris? Ŝi foriris kun li... Ne, ne elglitiĝu penso, mi volas aŭdi kion vi diras, vidi kion vi imagas!... Ke Mario ne min amas! Ĉu tio estas? Ke ŝi ne povas min ami... Jen la vero de tio, kion mi pensas... Terura vero!... Ŝia amo ne estas amo. Estis pli da respekto, ol da amo en ŝia inklino al mi. Severe edukita de sia patro, ŝi translokis al sia edzo la filan respekton, submetiĝe, rezignacie. Konfidante al mia aŭtoritateco, mi kredis iom post iom formadi por mi ŝian spiriton, samtempe kiam la naturo formadis la virinon... Mia mi povis nomi la korpan belecon, sed la ribela spirito neniam estis mia! Ĝia celo trovis formon kaj al ĝi iras la spirito, kaj post si trenos la tutan vivon... Korpon kaj animon!... Se tio jam ne okazis en mia foresto!... Emiliino parolis intence... Tie ĉi ĉiuvespere, ĉiam kune... Ve, la sola logo de mia vivo! Nun ĉio nigreco kaj malĝojo! Kial travivi vivon tiel mizeran? (*Rigardas sin en la spegulo*). Maljuniĝanta, malsana... Kiel ŝi povas min ami?... Ŝi, juna kaj bela!... Kiel bela ŝi estis!... Kaj mi ŝin lasis kun li... turmentinte ŝin per mia perforto, kiam eble ŝi sentis al mi malamon... malamon kaj malŝanton!... Kaj li, je ŝia flanko, belsintena, deloganta... Ho, ĝi ne povas esti! Mario estas honesta! Mi ne povas esti tiel malfeliĉa!... Kulpa nur estas la malestiminda, jes, la malestiminda rabisto, kiel tiu... kiel lia patro!... Mi ne povas

plu!... Mi sufokiĝas! Juljano. (*Sonorigas. Fuljano eniras*).

JUL. Kion ordonas la mastro?

Joz. Portu al mi la surtuton, la ĉapelon... rapide... (*Fuljano eliras*). (*La deka batas*). La deka! La deka... Kiel frue ankoraŭ!... Mi iros al la teatro, estas tempo... Mi estas febra... Mi iros tiel, kiel mi estas... Mi iros... Iru por veturilo... Ne... atendu... Mi piediros. (*Fuljano eniras*). Estas utile al mi piediradi... Vidi min ŝajnos al ili strange... ili ne min atendas... Kion diri?... Bah! Mi diros... diros... Mi pensos ĝin sur la vojo, tio ĉi min distros... Mi anoncigos min, kiel por vizito, mi ŝercos kun ili... Mi deziras paroladi, multe paroladi... tiun ĉi vesperon mi ne lasas Emanuelon paroli... Mi amuzos ilin, mi igos ilin ridi... ridi, jes... ridi! Kia traspensio! Ho ne! Mi ne faros ridiga teatraĵo por la aliaj tion, kio estas en mia koro terura tragedio... Mi atendas... Sed tiun ĉi nokton... tiun ĉi eternan nokton mi ne povas... Mi sufokiĝas! Mi bezonas piediradi, iradi multe, ĝis tio: fali plenlaca, disrompi miajn nervojn. se ne tiu ĉi nokto estus por ĉiuj pereiga... Mi estas freneza, mi ne respondas pri mi... La surtuton... (*Palpante ĝin interne*). Kio ĝi estas? Armilo!

JUL. La poŝa resolvero de via moŝto.

Joz. Ho! ne, ne... Formetu ĝin, formetu... Gardu ĝin. (*Eliras*).

JUL. (*Kun miro*) Sed, kio okazas tiun ĉi vesperon al mia mastro?

FINO DE LA DUA AKTO



# AKTO TRIA

---

*La sama dekoracio de la antaŭa akto*

## SCENO UNUA

EMANUELO *legante kaj poste* MARIO

MAR. (*Enirante*). Cu vi estas sola? Kaj Jozef-Ludoviko?

EMAN. Li eliris.

MAR. Alian fojon?... Estas strange! Li, kiu antaŭe nur eliris en necesega okazo, jam de kelkaj tagoj ne ĉesas eniri kaj eliri... Mi estas kun timo... Jozef-Ludoviko ne bonfartas.

EMAN. Ne, li ne bonfartas.

MAR. Belan tempodaŭron vi estas pasiganta!... Se vi deziris trankvilecon!

EMAN. Ne, tio ne. Se vi, do, sciis ke mi bezonas absorbiĝi en mi mem por ekkompreni ke mi estas la sama... la malkvieta kaj vagema Emanuelo por kiu senagiteco kaj ripozo estis sinonimoj de enkarceriĝo aŭ de morto... Mi komplezita kun tiu ĉi vivo, kiun, por tiel diri, oni donas al mi faritan, kaj sen priokupado pri alia afero, ol daŭrigi vivante?... Mi, kiu ĉiutage devis pensi

kaj okupi min... pri ĉio el kio konsistas la ĉiutaga ekzistado, pri ĉio ĉu granda, ĉu malgranda... Planfari negocon kaj ordoni la tagmanĝon, la borsajn likvidaĵojn kaj la kalkulon de la lavistino... Mi povis fidi al neniu. Maturaĝa fraŭlo estas kiel senmastra nekulturejo, pri kiu ĉiuj kredas sin kun rajto rikoltadi; kaj se krom ne edziĝi, nek havi idaron, oni ne lasas sin ekspluati de ĉiuj, bonan famon oni ricevas, kiel nekortuŝebla egoisto! Nur ni, kiuj ne havas idojn, povas taksii kiel multe valoras kontraŭ petemuloj la solena protesto de familiestro: «Mia amiko, mi havas idojn...» Per tio, kion kostis al mi ne ilin havi, mi povus esti subteninta du dekduojn.

**MAR.** Kial vi ne edziĝas? Vi ne scias, kiom mi ĝojus vidante vin edzigitan. Mi diras ĝin kiel mi sentas... Kaj ankaŭ Jozef Ludoviko tre ĝojus... Diru al mi... Ĉu vi neniam trovis en la mondo ian virinon, kiu milde vin kortuŝante, igis vin pensi... kun tiu ĉi virino mi vivus feliĉa!... En viaj vojaĝoj kaj senĉesaj ekskursoj vi neniam trafis plaĉan lokon, kie ŝajnas, ke nur ĝin rigardante la koro kvietiĝas pri siaj deziregoj?... Nu, kunigu en via penso tiun virinon kaj tiun ĉi lokon; kaj atente pripensu, kiel feliĉa vi estus pretigante kun ŝi vian amneston en tiu plaĉa anguleto ..

**EMAN.** Mi veturis preskaŭ ĉiam en ekspresa vagonaro kaj senhalte preterpasis... la lokojn kaj la virinojn!...

**MAR.** Se mi konus iun! Mi devas serĉi... Ĉu vi donas al mi permeson?

**EMAN.** Tiujn ĉi aferojn oni ne serĉas, sed oni trovas!



**Indostan'o.**—Grupoj formiĝis en Tiruvalla'o, Quilon'o kaj Trivandumo el la Travankore'a Provinco.

**Italujo.**—Gazeto «Roma Esperantisto» malaperis pro multaj okupoj de ĝia direktoro Lia Moŝto S-ro Kanoniko Giambene, sed tiu ĉi esperantistemulo ne povas nin forlasi, kaj li akceptis aparteni al la «Lingva Komitato».

**Kanado.**—En Saskatchewan sinjoro Noddings faras esperantajn kursojn kaj en tuta tiu lando esperanto progresas.

**Madejra.**—La anoj de «Seminaria Esperantista Klubo» de Funĉal'o, kie oni lernas Esperanton, klopodas por ĝia diskonigo en tiu insulo.

**Meksikujo.**—La gazeto «El Heraldo» el Matehuala'o enpresas bonajn artikolojn pri esperanto, kaj la plimulto el la gazetoj rilatas ĝin simpatie.

En Guadalahara'o, oni faras esperantan ekspozicion de verkoj, ĵurnaloj, k. t. p.

La ricevotaĵoj estos destinataj al esperanta Biblioteko, jam fondita, kaj oni eldonos senpage katalogojn pri ili.

«Esperanta Gazeto» Morelos, 472, Guadalajara, petas helpon de verkistoj, eldonistoj kaj de ceteraj samideanoj.

La juna meksika literaturisto sinjoro Amado Nervo, petis al tiea Ministro de Publika Instruado kaj Belaj Artoj, pri starigo de lingvo internacia kaj, ke tiu estu la hispana.

Ni aplaudas la unuan peton, sed ne la duan, kvankam deknaŭ nacioj parolas hispane. Ni ne volas tian honoron por ni hispanaj, nek por neniu nacio; lingvo neŭtrala estas por ni esperantistoj kaj estos por la tuta homaro, esperanto.

**Natalo.**—Grandan propagandon oni faras en Durban'o por diskonigi nian lingvon.

**Norvegujo.**—«Norvega Esperanta Gazeto», nova organo de la esperantistaj el tiu lando, direktata de S-ro Thompsen, esperigas al ni tie grandan esperantan progreson.

Nia fervora samideano Nils Okland

**Indostan.**—Se han formado grupos en Tiruvalla, Quilon y Trivandumo de la provincia de Travankore.

**Italia.**—La revista «Roma Esperantisto», ha desaparecido por las muchas ocupaciones de su director el ilustre Sr. Canónigo Giambene, pero este amante del esperanto no puede abandonarnos y ha aceptado el pertenecer al «Comité de la Lengua».

**Kanadá.**—En Saskatchewan, el señor Noddings da cursos de esperanto y en todo aquel país el esperanto progresa.

**Madera.**—Los miembros del «Club Esperantista del Seminario» de Funchal, donde se enseña el esperanto, procuran su divulgación en aquella isla.

**Mejico.**—La revista «El Heraldo» de Matehuala, inserta buenos artículos respecto al esperanto y la mayoría de los periódicos se refieren á él con simpatía.

En Guadalajara, se hace una exposición esperantista de obras, diarios, etc.

Lo que se percibirá será destinado á una Biblioteca de esperanto, ya fundada, y se editará un catálogo gratuito respecto á ellas.

«Esperanta Gazeto», Morelos, 472, Guadalajara, pide ayuda á los autores, editores y demás *samideanos*.

El joven literato mejicano Sr. Amado Nervo, ha pedido al Ministro de Instrucción Pública y Bellas Artes de allí, la institución de una lengua internacional y que esa sea la española.

Aplaudimos la primera petición, pero no la segunda, aun cuando diez y nueve naciones hablan el español. Nosotros no queremos tal honor para nosotros los españoles, ni para ninguna nación; la lengua neutral es, para nosotros los esperantistas, y será para toda la humanidad, el esperanto.

**Natal.**—Se hace gran propaganda en Durban para difundir nuestro idioma.

**Noruega.**—«Norvega Esperanta Gazeto», nuevo órgano de los esperantistas de aquel país, dirigida por el Sr. Thompsen, nos hace esperar un gran progreso allí.

Nuestro fervoroso *samideano* Nils Ok-

varbis por Esperanto la apostolon de la Pacifismo S-ron T. Sandstel Stavanger.

**Nova Zelando.**—La esperantistoj de Inverkargil'o tre sin okupas pri la divastigado de esperanto, kaj Registara Turista fako ĝin akceptis por korespondado kun eksterlando.

**Polujo.**—En Centshova ĉe la «Industria Terkultura Ekspozicio» estas esperanta fako.

En Varsovi'o, Lodz'o, Gosnovice'o, Czesstokova'o, Uloclavek'o, Lovicz'o, Siedice'o, Kielce'o, Faroslaw'o kaj Viln'o, oni faris kursojn, kunvenoj, paroladojn kaj aliajn agojn, kiuj montras tiean esperantan vivon.

En Czesstochowa'o oni aranĝas kongreson, esperantistan por la proksima somero kiu daŭros tri monatojn. La Direkta Komitato komprenante, ke ne ĉiuj siaj eksterlandaj samideanoj povos, pro malproksimo, partopreni en sia Kongreso, deziras ke oni alsendu al ĝi ilustritajn postkartojn kun saluto. La plej belaj estos enmetataj en luksan albumon, kiu post la ekspozicio estos lotita inter la sendontoj.

La gazetaro helpas nian aferon en tiu lando.

**Portugalujo.**—Ŝatinda «Portugala Revuo» aperis. Ni deziras al ĝi longegan vivon kaj plenumon de ĝia celo.

La esperantista movado pligrandiĝas en Oporto, Lisabono, Evora'o, Portelo kaj Arkos'o.

**Rumanujo.**—En 1889<sup>a</sup> aperis vortareto de f-ino Manetta Frollo. Dum 1903<sup>a</sup> estis nur du aŭ tri esperantistoj. En 1907<sup>a</sup> komencis en Bukarest'o la vera movado. Dum 1908<sup>a</sup>, la movado kreskiĝis; estis fondita en Bucharest'o la Societo Esperanto, kaj aperis la gazetoj «Rumana Gazeto Esperantista» kaj «Gazeto Esperanta».

Post la eldono de lernolibro de D-ro Kimel, pligrandiĝis la afero, kaj certe faras bonegan propagandon tio, ke en la proksima Oktobra monato okazos loka esperanta Kongreso en Foksani'o, motive festoj pro la datreveno de l'unuigo de la

land ha reclutado para el esperanto al apóstol del Pacifismo Sr. T. Sandstel Stavanger.

**Nueva Zelanda.**—Los esperantistas de Inverkargil, se ocupan mucho de la propaganda de esperanto, y la sección de Gobierno del Turismo lo ha aceptado para correspondencia con el extranjero.

**Polonia**—En Centshova, en la «Exposición Industrial de Agricultura», hay una sección de esperanto.

En Varsovia, Lodz, Gosnovice, Czesstokova, Uloclavek, Lovicz, Siedice, Kielce, Faroslavo y Viln, se han hecho cursos, reuniones, discursos y otros actos, que demuestran la vida esperantista de allí.

En Czesstochowa se organiza un congreso esperantista para el próximo verano que durará tres meses. El Comité Ejecutivo, comprendiendo que no todos sus *samideanos* extranjeros podrán por la falta de proximidad tomar parte en su Congreso, desea que se le envíen postales con saludo. Las más bonitas serán colocadas en un lujoso album, que después de la exposición será sorteado entre los remitentes.

La prensa ayuda nuestra causa en aquel país.

**Portugal.**—Agradable «Revista Portuguesa» ha aparecido. Nosotros le deseamos larguísima vida y que logre su propósito.

El movimiento esperantista aumenta en Oporto, Lisboa, Evora, Portelo y Arcos.

**Rumania.**—En 1889 apareció el pequeño diccionario de la Srta. Manetta Frollo. Durante 1903 había solo dos ó tres esperantistas. En 1907 empezó en Bucarest el verdadero movimiento. En 1908, creció; se fundó en Bucarest la Sociedad Esperanto y aparecieron los periódicos «Rumana Gazeto Esperantista» y «Gazeto Esperanta».

Después de la edición del Manual del Doctor Kimel, aumentó el asunto y seguramente hizo gran propaganda el que el próximo mes de Octubre tendrá lugar un Congreso local esperantista en Foksani, con motivo de las fiestas por el ani-

du rumanaj princolandoj Moldavia'o kaj Muntenio, kiu okazis la 6<sup>an</sup> de Februaro de 1859<sup>a</sup> pro elekto de Princo Aleksandro Joan I, Cuza, por reganto de ambaŭ landoj.

S-ro Kapitano Aleksandro Vivoschi kaj lia edzino Mario, el la urbo Iassy'o nomis sian ĵusnaskitan filinon, Mario—Esperanto. Niajn korajn salutojn al la tri.

Dimanĉo, la 16<sup>an</sup> de lasta Majo la virina grupo de Marasesti'o baptigis infaneton al kiu oni donis la nomon «Esperanto». La tolaĵo, kovrilo, k. t. p. estis fari-taj de la aninoj de la grupo, kaj verda stelo kaj litero E, troviĝas broditaj sur ĉiu objekto.

En Bukarest'o oni instruas esperanton en la militaj lernejoj de Artilerio kaj inĝenierarto, en la privata Angla-Germana instituto por knabinoj kaj en la Luma Hejmo, Reĝina Elizabeto, blindulejo.

En Ploesti'o ankaŭ oni same faras en la Izraelida Knabina Lernejo.

**Rusujo.**—Nia kunbatalanto «Ruslanda Esperantisto» reaparis. Nian bonvenon!

Tie, oni fondis societon, kies titolo estas «Tutrusa Esperanta Kuracisto», kun celo disvastigadi internacian helpan lingvon Esperanto inter kuracistoj, kaj ĝin uzi skribe, prese kaj buŝe, en internaciaj interrilatoj kun alilandaj kuracistoj.

Nova grupo fondiĝis en Kostroma'o.

**Svedujo.**—La 18<sup>a</sup> Kongreso por la paco okazos en Stokolmo dum la unua semajno de proksima Septembro.

Ni rememoras al la kongresanoj esperanton, la plej bonan interkomprenilon.

**Svisujo.**—Moviĝas la Neufchatel'a, Le Locle'a, Chateaux'a d'Ŭeux, Basel'a kaj Zurich'a grupoj kaj nova fariĝas en Laŭsane'o.

La Universala Unuigo de lernantoj estis fondita en Lucerna'o kaj adoptis esperanton, kiel helpan interkomprenilan lingvon.

**Usono.**—Alvenis al ni la tria numero de «La Simbolo», internacia gazeto kiun

versario de la unio de los dos principados rumanos Moldavia y Muntenio que se verificó el 6 de Febrero de 1889 por elección del Príncipe Alejandro Juan I, Cuza, para regir ambos países.

El Sr. Capitán Alejandro Vivoschi y su esposa María, de la ciudad de Iassy, han puesto por nombre á su recién nacida hija, María Esperanto. Nuestros cariñosos saludos á los tres.

El domingo 16 del último Mayo, el grupo femenino de Marasesti hizo bautizar un niño al cual se dió el nombre de «Esperanto». La ropa blanca, envoltura, etcétera, fueron confeccionadas por las cosas del grupo, y la estrella verde y la letra E están bordadas en cada objeto.

En Bucarest se enseña esperanto en las escuelas militares de artillería é ingeniería, en el Instituto privado inglés-alemán para señoritas, y en la Casa de Luz, Reina Isabel, asilo de ciegos.

En Ploesti también se hace lo mismo en la Escuela Israelita de señoritas.

**Rusia.**—Nuestro compañero de lucha «Ruslanda Esperantisto» ha reaparecido. ¡Nuestra bienvenida!

Allí se ha fundado una sociedad, cuyo título es «Tutrusa Esperanta Kuracisto», con el fin de difundir la lengua internacional esperanto entre los médicos y usarla por escrito en la imprenta y de palabra en las relaciones internacionales con médicos de otros países.

En Kostroma se ha fundado un nuevo grupo.

**Suecia.**—El 18 Congreso para la paz tendrá lugar en Stokolmo durante la primera semana de Septiembre.

Recordamos á los congresistas el esperanto, el mejor medio de entenderse recíprocamente.

**Suiza.**—Se mueven los grupos de Neufchatel, Le Locle, Chateaux d'Ŭeux, Basel y Zurich, y uno nuevo hay en Laussane.

La Unión Universal de estudiantes se ha fundado en Lucerna y ha adoptado el esperanto como lengua auxiliar para comprenderse mutuamente.

**Estados Unidos de América.**—Nos ha llegado el 3.<sup>er</sup> número de la «La Símbolo»

oni publikigas en Tacoma'o (Washington). Ĝi enhavas bonajn esperantajn literaturarojn kaj ni kredas kaj deziras, ke ĝi sukcesos.

La tiea Ministro de Hinujo Wu-Ting-Fang, komencis fervore la lernadon de esperanto.

De la 9<sup>a</sup> ĝis la 14<sup>a</sup> de Aŭgusto dua esperantista Kongreso fariĝos kun ekskursoj a la akvofaloj de la Niagara rivero.

**Venezuelo.**—Nova grupo ekzistas jam en Altagrado de Drituko.

**Hispanujo.**—La Burgos'aj ĵurnaloj rilatas pri la transloko al tiu urbo de Hispana Societo.

Ni jam diris pri tio, kaj publikigis la nomojn de la novnomitaj regantoj de nia societo, el kiuj pro ilia konita amo al nia afero, ni multe atendas.

Ili kunigis en tiea «Universala Hotelo», kie frate manĝis.

Milita komisario S-ro Sanz Cruzado, prezidanto de la tiea grupo, kiu estis en Vitoria'o, adresis al S-ro Esteban prezidanto de «Hispana Societo» la jenan telegramon:

«Akceptu korsaluton kaj deziron de homarkunigo, per paco kaj esperanta lingvo».

Oni lin respondis:

«Komitatanoj kunigitaj, tre dankas vian afablan korsaluton. Antaŭen».

Niaj fratajn salutojn.

Ĵus fondiĝis en Madrido virina esperantista grupo, kies direkta komitato estas: Prez-ino, f-ino Ludovikino Ayza; Vicprez-ino, f-ino Angelino Alcayde; Sek-ino s-ino Elizoo Gomez de Perogordo; Voĉdonantinoj, f-inoj Regino Alcayde, Mario Terezo Alcaide kaj Josefino Ayza. Loĝejo, st Madera Baja, 5, 7.

S-roj Robles y Calderon esperantistaj lernantoj publikigis en «El Porvenir» el Cartagena'o artikolon kuraĝigante liajn genajbarojn por ke ili lernu nian amatan lingvon.

«La Tierra» el la sama urbo, rilatas pri ekzamenoj okazintaj en tieaj «Gradi-

lo», revista internacia kiu se publikas en Tacoma (Washington). Contiene buenos trozos de literatura esperanta y creemos y deseamos su éxito.

El Ministro de China, allí, Wu-Ting-Fang, ha comenzado con fervor el estudio del esperanto.

Del 9 al 14 de Agosto, se hará un segundo congreso con excursiones a las cataratas del río Niágara.

**Venezuela.**—Un nuevo grupo existe ya en Altagrado de Drituko.

**España.**—Los diarios de Burgos se refieren al traslado de Hispana Societo a aquella ciudad.

Nosotros ya nos hemos referido á eso y publicamos los nombres de los nuevamente nombrados para regir nuestra Sociedad, de los cuales, por su conocido afecto á nuestro asunto, esperamos mucho.

Se reunieron en el «Hotel Universal» de allí, donde comieron fraternalmente.

El comisario de guerra Sr. Sanz Cruzado, presidente de aquel grupo, que estaba en Vitoria, dirigió al Sr. Esteban, presidente de «Hispana Societo» el siguiente telegrama:

«Aceptad un cariñoso saludo y el deseo de unión de la humanidad por la paz y el idioma esperanto.»

Se le contestó:

«Los individuos del Comité reunidos, agradecemos mucho su afable cariñoso saludo. ¡Adelante!»

Nuestros saludos fraternales.

Acaba de fundarse en Madrid un grupo esperantista de señoras, cuya Junta directiva es: Presidenta, la Srta. Luisa Ayza; Vicepresidenta, la Srta. Angela Alcayde; Secretaria, la Sra. Elisa Gómez de Perogordo; Vocales: las Srtas. Regina Alcayde, María Teresa Alcaide y Josefina Ayza. Domicilio, calle de Madera Baja, 5, 7.

Los Sres. Robles y Calderón, estudiantes de esperanto, publican en «El Porvenir» de Cartagena un artículo animando á sus vecinos á que estudien nuestra querida lengua.

«La Tierra», de la misma ciudad, se refiere á exámenes habidos en las «Es-

gitaĵoj lernejoj» per kies ago oni montris, ke ni havas kelkajn pli da bonaj esperantistoj.

Okaze de tio, la Cartagena'a standardisto S-ro Alfredo Saralegui faris bonan propagandan paroladon.

Ankaŭ bone paroladis S-ro George Cıklari, nia rusa amiko kiu tiam estis tie.

En Barcelona'o oni malfermis kurson en la «Ateneo Obrero» de la dua kvartalo, kies profesoro estas S-ro Bordas.

S-ro Dalman sekretario de la Berlitz'aj lernejoj ekkomencis alian.

Aliaj privataj ankaŭ tie estas, ĉar la tuta esperantistoj celas, ke dum la V<sup>a</sup> Kongreso oni aŭdu multe esperante paroli ĉe la Barcelonaj stratoj.

Baldaŭ eliros propagandaj folioj Katalune skribitaj. Kiuj volos ilin akiri sin turnu al S-ro Sekretario de la V<sup>a</sup> Kongreso.

Tiu hejma propagandmaniero estas imitinda de valencianoj, vaskanoj, majorkanoj galicanoj k. t. p. kiuj havas patrinan lingvon krom la oficialan hispanan.

«Tutmonda Espero» (Kataluna esperantisto) publikigas la portreton de la fama hispano Anĝelo Guimerá, aŭtoro de notindaj dramoj kaj aliaj verkoj skribitaj per Kataluna lingvo. Ni kunigas nin al la festoj faritaj en Barcelono por lin glori.

Novaj grupoj fondiĝis en Horta, Vilasaro kaj Arbos'o (Barcelona'o) kaj en Arbeca'o (Tarragona'o).

Ankaŭ fondiĝis grupo en Deŭsto (Vizkaja'o) kies prezidanto estas la agema S-ro A. Dominguez.

Sesdek hispanaj ĵurnaloj, pli malpli, laste publikigis artikolojn favore nia afero.

S-ro Belenguer el Teruel'o, esperanta profesoro, sciigas al ni, ke ĉe kurso, kiun li klarigas en tiea Ĝenerala Teknika Instituto, estas bonegaj gelernantoj, speciale instruitinoj fraŭlinoj Gregoria Perez kaj Rosario Fernandez, kaj dekunuaj infanoj Arturo Belenguer kaj Santiago Martinez, blindulo.

cuelas Graduadas», con cuyo hecho se demostró que tenemos algunos buenos esperantistas más.

Con motivo de esto, el abanderado de Cartagena Sr. Alfredo Saralegui hizo un buen discurso de propaganda.

También habló bien el Sr. Jorge Cíclari, nuestro ruso amigo, que entonces estaba allí.

En Barcelona se ha abierto un curso en el «Ateneo Obrero» del Barrio segundo, cuyo profesor es el Sr. Bordas.

El Sr. Dalmau, Secretario de las escuelas Berlitz, ha empezado otro.

Otros, privados, se hacen allí también porque aquellos esperantistas se proponen que durante el 5.º Congreso se oiga hablar mucho en esperanto, por las calles de Barcelona.

Pronto aparecerán unas hojas de propaganda escritas en catalán. Los que quieran adquirirlas dirijanse al Sr. Secretario del 5.º Congreso.

Esa propaganda casera es digna de ser imitada por los valencianos, vascos, mallorquines, gallegos, etc., que tienen una lengua maternal, además de la oficial española.

«Tutmonda Espero» (Cataluña esperantista), publica el retrato del famoso español Angel Guimerá, autor de notables dramas y otras obras, escritas en lengua catalana. Nos unimos á las fiestas celebradas en Barcelona para glorificarle.

Nuevos grupos se han fundado en Horta, Vilasar y Arbós (Barcelona), y en Arbeca (Tarragona).

También se ha fundado un grupo en Deusto (Vizcaya), cuyo presidente es el activo Sr. A. Dominguez.

Sesenta periódicos españoles, poco más ó menos, han publicado últimamente artículos favorables á nuestro asunto.

El Sr. Belenguer, de Teruel, nos entra de que en un curso que él explica allí en el Instituto General Técnico, hay magníficos estudiantes de ambos sexos, especialmente las institutrices Gregoria Pérez y Rosario Fernández, y los niños de once años Arturo Belenguer y Santiago Martínez, ciego.


# GRAVA AVIZO

Ofte oni ricevas en tiu ĉi redakcio anoncojn aŭ skribaĵojn troe vastajn rilate al aferoj, kiuj ne havas ĝeneralan intereson. Ni ne povas enpresi tiajn dokumentojn kaj ni konsilas la sendontojn sendi al ni 500 ekzemplerojn kaj ni plezure ilin enmetos en niajn disdonotajn gazetojn.

## Sprituldoj kaj Diversaĵoj

Sub la redakcio de Novejarque (Anĝelo)

### KRIPTOGRAFIO



Dividu la ĉi supran figuraĵon laŭ *du* ekzakte egalformaj pecoj, tiamaniere ke la literoj, kiuj entenas ĉiu el la du pecoj esprimu PROVERBON, t. e. *unu* proverbon en ĉiu peco (*du* proverbojn).

### HIEROGLIFO

# G TA

*Rimarkoj.*—La solvojn de tiuj ĉi *Sprituldoj* ni presos en nia venonta numero.

Ni publikigos la *nomojn de la solvintoj*, (kiuj ĝustatempe sendos sian solvon), en postvenonta numero.

La solvoj devas esti sendataj poŝtkarte.

Solvoj.—De la *Aritmetika Spritludo*:

DE K	=	10
K V I N	=	5
N A Ŭ	=	9
T R I	=	3
D U	=	2
S E P	=	7
K V A R	=	4
		40

(Sumon esprimanta la vertikala linio, de supre malsupren).

De la *Hieroglifo*: (Mil - i - o - nulo)  
(M) (I)(O) (O) MILIONULO.

## Memorindaj datrevenoj de Junio

- 1.—1800. Doktoro Jenner unuafoje eksperimentas la variolan inokulaĵon.
- 2.—1881. Mortas la fama scienculo Emilio Littré, aŭtoro de la grava *Leksikono de la Franca lingvo*.
- 3.—1863. Terurega tertremo en Manilo (Filipinaj Insuloj).
- 4.—1894. Dinamita eksplodo kaŭzas 200 mortigojn en Parksburgo (Virginio).
- 5.—1816. Mortas en Napolo (Italujo) la mondfama komponisto Johano Paisiello.
- 6.—1606. Naskiĝas en Rouen (Francujo) la fama tragedia poeto Petro Corneille.
- 7.—1640. Grava ribelo en Barcelono.
- 8.—1781. Brulaĵo de la Opera Teatro de Parizo.
- 9.—1870. Mortas la fama angla novelisto Karolo Dickens.
- 10.—1579. Mortas la mondfama portugala poeto Camoens.
- 11.—1294. Mortas la glora angla scienculo Rogerio Bacon alnomata la *Admirinda Doktoro*.
- 12.—1872. Inaŭguracio de la unua fervojo en Japanujo.
- 13.—1895. Mortas en Burgos (Hispanujo) la estro de la hispanaj respublikanoj Manuelo Ruíz Zorrilla.
- 14.—1837. Mortas la glora itala poeto Leopardi.
- 15.—1894. Estas proklamata sultano Muley Abdul Azis.
- 16.—1894. Atenco kontraŭ Crispi en Romo.
- 17.—1678. Tertremo en Lima (Peruo).
- 18.—1902. Tertremo en Kartageno (Hispanujo).
- 19.—1867. Estas mortpafata en Querétaro la meksika Imperiestro Maximiliano.

- 20.—1520. La Papo Leono X-a ekskomunikas Martin Lutero'n.  
 21.—1828. Mortas en Parizo la eminenta literaturisto hispana Leandro Fernandez Moratin, aŭtoro de *La Jeso de Knabinoj*.  
 22.—1527. Mortas la mondfama Maquiavelo.  
 23.—1884. Francujo postulas de Ĥinujo 250 milionojn por leĝrompo de la Traktaĵo de Tien-Tsin.  
 24.—1894. La anarĥiisto Caserio mortigas en Lyon la prezidanton de la Franca Respubliko Sadi Carnot.  
 25.—1822. Mortas la fama novelisto, desegnisto kaj muzikisto svisa Hoffmam, aŭtoro de la ĉiekonataj *Fantaziaj Rakontoj*.  
 26.—1771. Naskiĝas la fama novelisto kaj poeto Skota Walter Scott.  
 27.—1901. Internacia konkurso de Aŭtomobiloj de Parizo al Berlino.  
 28.—1712. Naskiĝas en Ĝenevo (Svisujo) la mondfama verkisto filozofo, komponisto, poeto kaj botanikisto Johano Jakobo Rousseau.  
 29.—1855. Mortas Delfine de Girardin alnomata *La deka Muzo*.  
 30.—1882. Estas pendigata en Washington, Guiteau, mortiganto de Garfield, XX-a prezidanto de Usono.

Kolektis kaj tradukis,  
 ESP-ISTO 17.206.

## ANONCOJ

Valenciana Sinjoro Bernardo Sanz.—Rue des Orteaux, n.º 47. Paris, 20. Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

Moskva Librejo «Esperanto» (Iverskaja 28, Moskvo, Rusujo). Akceptas mendojn por ĉiuj esperantaj libroj, kaj abonon por la ĉiumonata ĵurnalo «La Ondo de Esperanto» (la prezo 1'06 Sm. jare).

La Sekretario de la esperanta klubo Melbourne'a—Australia—tre deziras ricevi de aligrupaj kolegoj, ekzemplerojn de grupcirkuleroj, propagandilojn, k. t. p. Liaflanke, li interŝanĝe sendos ekzemplerojn de la propaganda flugfolio Melbourne'a, kiun alte laŭdis eminentuloj.

A. Melis, calle Mayor, Pueblo Nuevo, Barcelona.—Deziras korespondi per *l. aŭ p. k.* Ĉiam respondos.

S-ino Mary Baus, 29. Cleveland Street, North Amherst, Ohio, Usono. Deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun alilandaj geesperantistoj. Tuj kaj ĉiam respondos.

*Tre Grava!*—Dum la monato Majo, eliris gvidlibreto pri Barcelono kun ilustraĵoj. Ĝi estos sendata al la Kongresanoj de la V<sup>a</sup>, al la esperantaj kaj neesperantaj gazetoj, al la societoj kaj grupoj, kaj al «ĈIU ESPERANTISTO» kiu petos ĝin per ilustrita poŝtkarto (1) al unu el la jenaj adresoj.

«Tutmonda espero (Kataluna esperantisto)»: Paradís, 12, Barcelona.

«Societat d'atracció de forasters,» Rambla del Centre, 30, Barcelona.

(1) (Ĉar oni intencas ekspozicii la ricevotajn poŝtkartojn oni petas, en landoj kie ĝi estas farebla, alĝui la markojn sur la vidajflankon).